

Pri la testado de la Esperanto-instruado

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 597/93-2, 1982 julio 01 kaj 03.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-93/SRI-1982-93-2-597-Claude-kaj-Andree-GACOND-Pri-la-testado-de-la-Esperanto-instruado.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Kiel ni raportis al vi la pasintan semajnon, aŭdigante gelernantojn, por la deka fojo mi havis la okazon eksperimente instrui esperanon en unuagrada lernejo.

A.- Hodiaŭ, antaŭ ol ion rakonti pri tiu ĉi kurso al dek kaj dekunu-jaraj infanoj, ni ankoraŭfoje aŭdu ilin en momento dediĉita al la laŭtleĝo de ĉapitro de la lernolibro Esperanto por Infanoj de Gladstone Solomon:

(leciono en la lernejo)

Cl.- Kiel ni raportis la pasintan semajnon la kurso entute daŭris unu jaron kaj duonon je la ritmo de po du studmomentoj de dudek minutoj en la semajno. Estas vere malmulte, ĉefe kiam oni kalkulas, ke kvarono de tiu ĉi studtempo forfalis pro plej diversaj kaŭzoj: instruistaj kunsidoj, lernej-ekskursoj, sportaranĝoj, pretigo de spektaklo lerneja, ktp. El la dek eksperimentoj, kiujn mi gvidis, tiu ĉi estis la plej malfacila, tre verŝajne, ĉar ni provis grupigi ĉiujn interesatajn gelernantojn el ĉiuj samnivelaj klasoj: unue la interesatojn de kvin klasoj de la kvara lerneja jaro. Post kvin monatoj tiuj gelernantoj komencis novan lernejan jaron kun novaj horaroj, kaj la instruado ĉesis disvolviĝi fine de la mateno inter la deknua horo kaj duono kaj dek minutoj antaŭ la dekdua horo. La gelernantoj devis veni en la lernejon duonhoron antaŭ la komenciĝo de la lerneja mateno, tio estas jam je la sepa horo kaj duono, kaj estis malfacile tuj grupigi la tutan esperanto-klason, ĉar ofte malfruaj alvenoj alportis daŭrajn perturbojn.

A.- Ni iom detale raportas pri tiuj ĉi malfacilaĵoj, ĉar ni estas pli kaj pli konvinkitaj, ke ĉie, kie esperanto estas enkondukita ekster la oficiala studprogramo, similaj malhelpoj manifestiĝas.

Cl.- Pro tio nur instrumanieroj bone adaptitaj al tiuj ĉi cirkonstancoj povas konservi la lernemon ĉe la gelernantoj. Pri kelkaj el ili ni jam havis la okazon raporti antaŭ du jaroj, kornklude al la naŭa eksperimento, interalie pri la pergesta kaj perbilda instruado, kiu montriĝas ankaŭ tre efika por la instruado de esperanto al plenkreskuloj.

A.- Ĉi foje la celo de la eksperimento ne estis perfektigi instru-teknikon, sed iom post iom ekzameni, kiel oni povus mezuri la rezultojn atingitajn kaj ilin kompari kun tiuj de aliaj fremdaj lingvoj, konsiderante ne nur la instrudaŭron : nombro de jaroj, sed la studtempon entute kaj reale havitan antaŭ ĉiu kontrolo.

Cl.- Por kontroli la komprenon de la gelernantoj mi trovis rimedon, kiu havis grandan sukceson kaj montriĝis bona mezurilo. Mi desegnis al ili stultaĵojn. Ĝuste la ideo mem desegni ion kvazaŭ songan amuzis la infanojn, kaj mi povis kontroli, ĝis kia grado ĉiu individue komprenis min. La tuta ekzerco estis konsiderita de la gelernantoj kiel ludo. Unue, kaj ĉiu absolute individue provis grafike reprezenti tion, kion mi rakontis. Kaj poste ni komparis la desegnaĵojn reaŭskultante mian rakonton, notante, kiu bone komprenis, kiu mezbone komprenis, kaj kiu ne komprenis. Ni alvenis al tria ekzerco: helpe de la plej kompleta desegnaĵo la klaso kolektive refaris la rakonton. Tiu ĉi tria ekzerco montriĝis tre fruktodona por la plej mallertaj gelernantoj, kiuj havis tiel la okazon ripeti la tuton. Kaj

rikoltante la desegnaĵojn mi fakte posedis individuigitajn testojn, dum la infanoj havis la senton, ke ili bone amuziĝis.

A.- Sed vi verŝajne deziras ricevi ideon pri tiuj ĉi rakontoj. Jen unu el ili, kiu korespondas al la kontrolo pri la vortaro en rilato kun la korpo.

Cl.- Desegnu homon, kies kapo similas al pomo. La okuloj estas tasoj. Anstataŭ la nazo metu forkon kaj por la buŝo tranĉilon. La kolo de tiu monstra homo estas fenestro kun belaj kurtenoj. Por la korpo desegnu grandan ovon. Kolorigu la ovon ruĝe. Tiu ĉi homo havas kvin brakojn, kaj ĉiu brako havas manon kun ok fingroj. Ĉe ĉiu mano la fingroj havas tiujn ĉi ok kolorojn : unu fingro estas verda, alia blua, ankoraŭ alia verda, sed neniuj estas ruĝa. Por la aliaj koloroj decidu mem. Mi forgesis diri, kiel estas la ĉapelo. Ĝi similas al aŭtomobilo, kaj la oreloj al serpentoj. Fine, enkadrigu vian desegnaĵon per la bruna koloro, kaj ne forgesu skribi vian nomon super la kadro per majuskulaj literoj.

A.- Oni povas imagi multajn tiajn desegno-rakontojn, kiuj devas esti bone gradigitaj. Unue ili petu tre simplajn aferojn. Kaj poste en pli kaj pli kompleksaj frazoj, ili ĉerpu el la tuta vortprovizo ĝis nun akirita.

Cl.- Multajn aliajn kontrolojn mi imagis. Antaŭ ol komenci dekunuan instru-eksperimenton mi unue finpretigos tiujn ĉi testojn. Tio tucerte reprezentos grandan laboron. La gravaĵo estas, ke la testoj mem ne forrabu instrutempon, sed kontraŭe kontribuu al la vigligo de tiu ĉi instruado. Tiel oni samtempe kontrolas la komprenkapablon de la instruatoj kaj antaŭenigas ilin en la asimilado de la lingvo.

A.- La granda afero estos poste elprovi samstilajn ekzercojn en la instruado de aliaj lingvoj ol esperanto, por povi ricevi mezureblajn komparojn.

Cl.- Aliaj bonaj kontrol-ekzercoj estas la disdono de bildoj, kiuj malsimilas per detaletoj kaj proponi sub formo de etiketoj diversajn priskribojn. La lernantoj metas la etiketojn sub la korespondajn bildojn.

A.- Alia testo povas troviĝi al la gelernantoj kaŝitan bildon helpe de punktoj, kiujn ili devas trovi kaj kunligi.

Cl.- La gravaĵo estas, ke neniam monotoneco kondukas al tedo.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond raportis pri ĵus finanta instru-eksperimento de esperanto en unuagrada lernejo de la urbo La Chaux-de-Fonds. Ĝis reaŭdo!